

# NIA VOĈO

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)  
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**NOVIEMBRO 2005**

### ĴUS APERIS LA HISPANLINGVA VERSIO DE "LA HOMO KIU DEFIIS BABELON"

Finfine aperis hispanlingve "EL HOMBRE QUE DESAFIÓ A BABEL". Temas pri eksterordinare emocia biografio de la kreinto de nia lingvo, genia sintezo de la vigla ĵurnalisma stilo de René Centassi kaj de la historia rigora esploro de Henri Masson. Jen rekomendinda belega donaco por la tuj venontaj festoj:

#### **"El hombre que desafió a Babel"**

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj, sed por vendoj ĜIS DECEMBRO, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton:

po 23 eŭroj vi ricevos "El hombre que desafió a Babel" kaj "Nuevo Método de Esperanto"; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

#### **11ª ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO EN MALAGO**

La dimanĉon 9an de oktobro fermiĝis la 11a Andaluza Kongreso de Esperanto okazinta dum tiu semajnfino en la bela marborda urbo Malago. En ĝi partoprenis homoj devenintaj el multaj malsamaj landoj eŭropaj kaj neeŭropaj. Tre probable temas pri la plej internacia el ĉiuj andaluzaj kongresoj.

La kongresanoj ankaŭ havis tre bonan oportunon viziti la mirindan urbon Malago. Dum la dimanĉo, okazis grupa vizito al la "Alcázares" kaj ankaŭ perbusa promonado tra la tuta urbo en unu el tiuj simpatiaj turismaj duetaĝaj vehikloj.

La Andaluza Kongreso de Esperanto kunmemoris la 4an centjariĝon de Don Kihoto: okazis publika legado en esperanto de la du unuaj ĉapitroj de la verko fare de esperantistoj el 12 diversaj landoj. Ĉiuj legintoj ricevis kiel donaco unu ekzempleron de la esperanta versio de la verko de Cervantes. Giorgio Silfer prelegis pri "Don Quijote en ne hindeŭropa lingvo: la hungara traduko". Dum la kongreso estis ekspoziciitaj la desegnoj de la Internacia konkurso "Kiel vi vidas Don Kihoton", organizita de HEF.

#### **13a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**

La dektria Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, superis sian propran rekordon. Nunjare aliĝis 110 gesamideanoj, el kiuj 62 estis eksterlandanoj, precipe francoj, el 10 naciecoj.

Dum la Semajno prelegis Stano Marček, ĉefa redaktoro de la UEA-organo "Esperanto", Antonio Marco Botella, Luis Serrano kaj Pere Navarro-Rosines, profesoro pri Botaniko en la Universitato de Barcelono. Ankaŭ estis prezentita Esperanto-libro de Antonio Marco Botella sub la titolo "Esperanto en Katalunio". Kun ĉeesto de la urbestro de Calella Josep Basart i Pinatel-li (iam lernanto de Esperanto) oni inaŭguris en apuda Parko Dalmau muran memortabulon.

Oni aljuĝis Premion Ada Sikorska Fighiera al Raymond Boré. Kaj neniel forgesbla estas la aktorado de la trupeto el Montpelier "ĜO-JO" "kiu perfekte amuzigis nin per iliaj skeĉoj kaj komedietoj.

(ekstrakto el raporto de LUIS SERRANO).

#### **HEF-PREZIDANTO AGADAS EN LA E-MONDO**

Okaze de Monda Tago de Turismo kaj Eŭropa Tago de Lingvoj, en septembro 2005, okazis en Bydgoszcz (Pollando) la 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo (30-a IFTEK) kaj 28-a Sesio de AIS-Klerigejo en Bydgoszcz (AKB). Partoprenis reprezentantoj de 20 landoj, inter ili la Prezidanto de HEF Augusto Casquero kiu reprezentis Hispanion. Li prelegis pri "Lingvoj en Hispanio" kaj "Esperanto kiel lingvo de amikeco", Riĉan popular-sciencan programon de la Forumo kaj Sesio ilustritan per kelkaj filmoj kompletigis Hispana Vespero kun valencia "paella", preparita de Augusto mem. En Monda Tago de Turismo Augusto gvidis kursojn de Esperanto kaj hispanan.

En septembro, tricento da personoj estis atendataj ĉe la 21a ARKONES en Poznano (Pollando). La kvanta sukceso de ĉi tiu (ĉiujara!) kultura kaj literatura aranĝo ŝajnas vekti optimismon kontraŭpeze al la pesimismo vekita de la lasta KEF en Finnlando (post kvinjara paŭzo). Denove Augusto Casquero, kiu loĝas en Pollando ĝis la fino de la jaro, aktive partoprenis en la renkontiĝo.

**BAZA KURSO EN VALLECAS**

Ekde oktobro, sabate matene okazas e-kurso por komencantoj. Gvidas Pedro Hernández en: Librería Muga, Avda. Pablo Neruda, 89, Madrido. Tfno: 91-5079084/85

**4-A CENTJARIĜO DE "EL QUIJOTE"**

Kadre de la kiŭota projekto de Hispana Esperanto-Federacio rolis ankaŭ la **desegnokonkurso** „Tia mi vidas Don-Kiŭoton”, destinita por infanoj ĝis la 14-a vivojaro. Sciigon pri tiu ĉi konkurso ricevis de sia hispana korespondanto ankaŭ instruistino de baza lernejo en Pollando. Ŝi promesis partoprenigi siajn lernantojn, tamen tio montriĝis problemveka, ĉar la lingvaĵo de la libro ŝajnis al la instruistino tro malfacila por ŝiaj kvaraklasanoj. Jen kion ŝi mem rakontas pri la okazintaĵo: „Mi ne povis rakonti al ili Don Kiŭoton, ĉar jam mi donus propran opinion. Sed mi riskis kaj mi eklegis fragmentojn de la libro. La infanoj volonte aŭskultis, ridis kiam necesis (...) kaj ili mirigis min: ili kaptis tion, kio vere gravas”. Poste evidentiĝis, ke ili estis la plej junaj gepartoprenintoj de la konkurso. Iliaj verkoj tre plaĉis en Hispanio kaj la instruistino havis okazon klarigi al la gepatroj de siaj lernantoj, kiamaniere iliaj desegnaĵoj trafis al fora Hispanio. „Tiamaniere la konkurso estis ankaŭ bona propagando por Esperanto” - konkludas la pola aŭtorino de la artikolo Grazyna Zubryzyska, instruistino el Pollando, kies lernejoj partoprenis tiun desegno-konkurson. Ŝi organizis oficialan lernejan ceremonion kun ĉeesto de la familioj, dum kiu oni enmanigis al la infanoj la diplomojn kaj donacetojn senditaj de HEF.

La 47 desegnoj ricevita estis ekspoziciataj dum la HEF-Kongreso ĉe la Publika Biblioteko de Alcalá de Henares kaj en Malago dum la Andaluzia Kongreso.

**NOVA KURSO HISPANLINGVA DE ESPERANTO EN INTERRETO**

Joachim Boehmeke kreis novan E-kurson, en hispana lingvo. Temas pri adapto de la germana kurso de la Germana Esperanto-Junularo. Kvankam ĝi ne havas sonajn ekzemplojn, ĝi prezentas la esperantan fonetikon ne nur per komparoj kun aliaj lingvoj, sed ankaŭ per la signoj de la Internacia Fonetika Alfabeto: <http://www.boehmeke.de/ESPERANTO/Indekso.htm>

**LIBROSERVO DE SATEH SUKCESE AKTIVIS EN LA ANDALUZA KONGRESO**

SATEH muntis libroservon en Malago okaze de la andaluza kongreso. La financa rezulto estas sufiĉe kontentiga. Vendiĝis ĉiuj plej altvaloraj alportitaj libroj: PIV-2005, Vortarego Es-Eo, PIV-2002, Quijote, La danĝera lingvo, Vojaĝo en Eo-lando, Liberecanaj pensoj, La interna milito en Francio, kaj aliaj malpli valoraj (laŭpreze). Kaj la andaluza asocio, ege dankinde, donacis al la SATEH-Libroservo gravan stokon da libroj.

**LA INFORMO GRIN REKOMENDAS ESPERANTON**

Profesoro François Grin, de la svisa Universitato de Ĝenevo, redaktis 127-paĝan informon pri la lingvaj problemoj en Eŭropa Unio, laŭ peto de franca institucio, la Alta Konsilio pri Taksado de la Lernejo (Haut Conseil de l'Evaluation de l'Ecole). En tiu informo, Grin reliefigas la enormajn profitojn kiujn ricevas Britio kaj la anglalingvaj landoj pro la trudo de la angla lingvo al la ceteraj landoj kaj speciale al Eŭropa Unio: la cifero atingas 18.000 milionojn da eŭroj, pro la restado en Britio kaj anglalingvaj landoj de centmiloj da homoj por lerni la lingvon, kaj pro la eldono de libroj kaj produktoj ligitaj al la angla lingvo.

Li rekomendas, kiel logika solvo, la uzon de Esperanto kiel eŭropa laborlingvo.

François Grin prelegos dum la venontjara Universala Kongreso en Florenco, Italio.

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal  
San Alejandro 6- 4ºB EXT  
28005 Madrid